

INTERLANGUAGE



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE



PROKLAMU  LIBERECON  
TRA LA TUTA MONDO

AMERIKA ESPERANTISTO

*Oficiala Organo de la  
ESPERANTO-ASOCIO  
de NORD-AMERIKO*

**SEP - OCT, 1954**

## AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

114 West 16th Street

New York 11

N. Y.

Vol. 68

Nos. 9-10

*Associate Editors:* Dr. William Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Myron Mychajliw.


*Sustaining Board:* Portia Anderson, Dr. Luella K. Beecher, Dr. F. W. Breth, John M. Brewer, A. M. Brya, Jarvis E. Bush, A. Chmielewicz, C.C. Cummingsmith, S. M., Preston Davis, Jr., Ernest G. Dodge, Esperanto Association of New Jersey, Anonymous, Bertha E. Mullin, Tony Nabby, C. D. Prewitt, George Hirsch, Wilfrid Rouleau, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, David Therrien, Mazah Schulz, W. E. L. Todd, Flora Wyman.

*Office Assistants:* Lola Mae Muse, H. S. Harris

# KON-TIKI

By THOR HEYERDAHL

The greatest true adventure story ever! Now available in Esperanto. 6 modern Norsemen cross the Pacific on a 40-foot raft to unravel a 1000-year-old mystery. From first gripping page to last, you will say it's wonderful. The Esperanto edition has been translated in vivid, flowing style, retaining all the wry good humor and exciting adventure. With 80 photographs. Bound in blue cloth, stamped in gold.



\$3.90 Postpaid

Enjoy reading this exciting best seller today! Order from:  
Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Jarabono eksterlande por kalendara jaro: \$1.50 aŭ egalvaloro.  
Subscription rate in the United States and Canada: \$3.00 per year.  
Make checks payable to the *Esperanto Association of North America*.

*Patron Membership in the EANA* — \$10.00 per year  
*Regular Membership in the EANA* — \$5.00 per year  
*Student Membership & Armed Forces* — \$3.00 per year

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 68

SEPTEMBER-OCTOBER 1954

Nos. 9-10

## ESPERANTO VERSUS BABEL

AT the time of the Geneva Conference, on July 14, 1954, the New York Times printed a picture showing the French Prime Minister, Pierre Mendes-France, and the Chinese Communist Premier, Chou En-lai, at a private meeting. "An interpreter separates them," the caption said.

Without elaborating here on other factors which also "separate" the Communist world from the West, we might well consider this caption as another example of the dividing influence which the language problem exercises in international relations.

People throughout the world realize more and more how bothersome and serious the language problem is, and many of them are ready to make up their minds to do something about it. This became strikingly evident again at the Thirty-Ninth Universal Esperanto Congress held at Haarlem, Holland, from July 31 to August 6, with the participation of more than 2,000 members from all over the world.

Addressing the Haarlem Congress in fluent Esperanto, the Prime Minister of the Netherlands, Dr. Willem Drees, declared: "At other conferences... the diversity of languages presents an obstacle to fluent effective discussion. It often discriminates among participants, some of whom are allowed to speak in their own language while others are not permitted to do so, some of whom understand what is being said while others are unable to follow. On such occasions, language is a divisive factor creating undesirable discrimination and great difficulties... At this Esperanto Congress, however, matters are different. The language which all of you speak is no one's native tongue. All of you meet on a basis of equality, speaking a language which all of you had to learn and which all of you find convenient to handle. This language has established a strong link among you... In spite of opposition, which has to be expected, Esperanto has already accomplished a great deal and has rendered useful services..."

At the Haarlem Congress, not only the Dutch Prime Minister, but also the Mayor of Haarlem made their welcoming speeches in excellent Esperanto. Ten governments sent official representatives: Australia, Austria, Belgium, Brazil, France, Western Germany, the Netherlands, Norway, Sweden, and Switzerland. Most of these government representatives also spoke in Esperanto, and, according to the New York Times, it created quite a stir when one of them did not. At the opening session, addresses of greeting were also heard from representatives of Esperanto organizations from all over the free world. Doris Tappan Connor spoke for the Esperanto Association of North America.

At least 10,000 persons from all countries outside the iron curtain attended international and national Esperanto conferences during the past few months. These included, for instance, an International Esper-

anto Congress of Railroad Employees at Verona, Italy, attended by 541 members, under the honorary presidency of the Italian Minister of Transportation.

The Esperanto Association of North America held its Forty-Fourth Annual Congress with great success at New York City, from June 18 to 21, with members attending from all parts of the United States and with guests from New Zealand, Japan, the Philippines, Colombia, France, and the Netherlands.

During the coming months, leaders and members of the Esperanto movement will focus their attention on Montevideo, Uruguay, where Esperanto is on the agenda of the General Conference of UNESCO (the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organization), scheduled to be held from November 12 to December 11. The General Conference will discuss what action to take on a petition in favor of Esperanto which was presented to the United Nations in August 1950 and which obtained 895,432 individual signatures as well as the support of organizations with a combined membership of more than 15½ millions throughout the world.



## FIRST THOUGHTS OF CHRISTMAS USE ESPERANTO GREETING CARDS

If you want your Christmas greeting to be different, use Esperanto greeting cards this year. Here are two offers especially suited to your needs. Both selections are of highest quality and truly artistic.

### **No. 1** Beautiful, super-quality Esperanto Christmas cards.

The outside cover design: A large Esperanto Green Star, cleverly made up as Santa Claus, printed on a background of white de luxe "Fiesta" paper with art deckle edge dyed a beautiful green. The message in Esperanto inside: Appropriate and in good taste, surmounted by a small green star, ends with the old familiar greeting *Gojan Kristnaskon - Feliĉan Novjaron*. The matching envelopes have the same green deckle edges on the back flap. Size 4 3/4 x 6 3/4 inches. Postpaid. Net prices include envelopes:

12 for \$2.35; 24 for only \$3.50 (less than 15¢ each); sample for 25¢

**No. 2** Assortment of 10 Christmas postcards, each with a different Esperanto design, printed in three and four colors. All with bright, cheerful illustrations and the Esperanto greeting: *Bondeziras por Kristfestoj kaj Novjaro*. In sets of ten.

10 cards for 60¢; 50 for only \$2.50; sample for 10¢ - all postpaid

Order your Christmas supply NOW from:

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

## ESPERANTO EXPERIMENT IN SCOTTISH SCHOOLS

**T**HE EDUCATION COMMITTEE OF MIDLOTHIAN, in Scotland, has just started an interesting and important experiment on language-learning. Some years ago, in England, there was published a report which claimed that the learning of Esperanto is a good basis for the learning of the French language, and that many children, who had previously learned Esperanto, were more successful in learning French than other children who had no previous instruction in Esperanto. Since the English report was based on results gained in only one school, the Education Authority of Midlothian embarked on an experiment in their schools on a wider and more strictly checked basis, to find out whether the claims of Esperanto as an aid towards the learning of French were really provable.


The project started in 1953 with the necessary preliminary work of teaching the teachers Esperanto. About 20 experienced teachers agreed to learn the language with the object of teaching it later to children in the highest classes of the elementary schools concerned. Twice each week, for periods of an hour each, from September 1953 to March 1954, they were taught by an experienced Esperantist.

The experiment consists of two stages—(a) the teaching of Esperanto to half the children belonging to the "A" stream (the most intelligent children), aged 11 to 12 years and attending different elementary schools, and (b) the follow-up of the progress of all the "A" stream children—those who have been taught Esperanto and those who have not—over the first three years of their secondary school careers. The size of a complete "A" group in Midlothian is in the region of 360. To provide a number large enough to produce valid results, the experiment has been duplicated, so that, finally, the data will be concerned with a total of over 700 children, half of whom have studied Esperanto. To make sure that the Esperanto basis was adequate, the Education Authority requested the British Esperanto Association to arrange examinations.

Circumstances have made it necessary to teach the children Esperanto during the Summer Term only. For two periods a day over ten weeks, the lessons take place, making altogether over 70 hours of Esperanto instruction. This summer one group of 180 children have taken the course and sat the examination with satisfactory results.

From September, the second stage begins for the first group of "A" stream children. All of them—180 "Esperantised" along with 180 "non-Esperantised" children of the same age and equally intelligent—will find themselves in different "Grammar Schools" to continue their education. They will all learn French, and from time to time their progress in this study will be measured, and a comparison made between the progress of the children who have previously studied Esperanto and the progress of those who have not had this tuition. In this way, there will be found out how much influence the previous learning of Esperanto has on the subsequent learning of French. The experiment will continue over a five year period. To reach a trustworthy conclusion about the results, a great deal of statistical work will be necessary, and in this work the Education Committee of Midlothian will enjoy the cooperation of the internationally known Scottish Council for Research in Education.

## ESPERANTO IN ACTION



**The Governor of the Brazilian State of Paraná**, Dr. Bento Munhoz da Rocha Neto, delivered the opening address at the Fourteenth Brazilian Esperanto Congress held at Curitiba in connection with the celebration of the hundredth anniversary of the State's political emancipation. The Governor urged all members of the Esperanto movement to work for "the day when all those who write will write in their native tongue and in Esperanto, ... when this will bring about a tremendous victory for the culture of all nations because their citizens will have become bilingual."

**Queen Elizabeth of England** replied to a message of greeting received from the Nineteenth New Zealand Esperanto Congress at Wanganui: "The Queen sincerely thanks you and all who attended the 19th Congress of the New Zealand Esperanto Association for your kind and loyal message which both Her Majesty and the Duke of Edinburgh warmly appreciate."

**The Universal Esperanto Association**, with which the Esperanto Association of North America is affiliated, was proposed by Carl Henry, Member of the Norwegian Parliament, as a candidate for the Nobel Peace Prize.

**The newspaper of the German Mine Workers' Union**, *Die Bergbau-Industrie*, with a weekly circulation of 700,000, began publication of serialized Esperanto lessons early this year. According to the editors, the lessons, directed by Hermann Theobald, are being enthusiastically received by many union members.

**In Finland**, three newspapers now publish serialized Esperanto lessons. In Helsinki, the Finnish capital, an Esperanto class for railroad employees, held on the premises of the railroad administration, has 29 students.

**In Strasbourg, France**, capital of the Council of Europe, Esperanto is now taught at two public elementary schools.

**The Esperanto Association of North America** and the *American Esperanto Magazine* are both listed, on pages 181 and 186 respectively, of "A Directory of Useful Addresses" in the 1954 directory volume of the Publications of the Modern Language Association of America.

**Serialized Esperanto lessons** have recently become popular with newspapers and magazines in Italy. Latest additions to the list include: *Giovani*, a youth magazine in Turin, with a circulation of 70,000; *Vita Vicentina*, a high class illustrated magazine published at Vicenza, Northern Italy; and *Il Pungolo Verde*, a monthly magazine in Campobasso, Southern Italy.

**The Teachers College of Bandung, Indonesia**, is the first public institution of learning in that country to feature an Esperanto class. Esperanto is taught in several private schools in the Indonesian Republic.

**A French judge** living in the city of Nimes, who, a number of years ago, had published a book about the protection of animals throughout the world, wanted to bring it up-to-date for a new edition. When he found it difficult to gather information which he needed, a friend suggested the use of Esperanto and obtained in record time valuable documents from a number of countries including Denmark, Spain, and Britain.

**A beautiful 191-page picture book about the Netherlands** in Esperanto was recently published in The Hague. Full page photos, art bound, 9x12½, now available from EANA. Net price, after discount, \$7.90.

**In reply to a UNESCO inquiry**, the Austrian Government has declared its willingness to sign an international agreement introducing the compulsory teaching of Esperanto in all elementary, secondary, and higher schools, provided that at least five countries sign and ratify such an agreement.

**In Switzerland** the French-language organ of the cooperative movement, "Coopération", published at Basel, recently began to run serialized Esperanto lessons in 12 instalments.

**The Central Executive Committee** of the *Brazilian National Council of Statistics* recently adopted a resolution proposing that Esperanto be used as one of the official languages at the 29th Meeting of the International Institute of Statistics, scheduled to be held in Brazil in 1955. The Brazilian Institute of Geography and Statistics has used Esperanto for many years as its official international auxiliary language.

**In Norway**, according to information gathered by the Norwegian Esperanto League, 668 articles and news items about Esperanto appeared in 124 newspapers and magazines, in the course of the year 1953.

**In the Free Territory of Trieste** Esperanto is now taught in the Columbus Association and at the Cesare Battisti Institute.

**British railroad stations** at which posters carrying information about Esperanto and local Esperanto activities are in evidence include the following: London (Euston Road Station), Glasgow, Birmingham, Liverpool, Edinburgh, Southampton, Oxford, Aberdeen, Bristol, Brighton, Leeds, Leicester, Newcastle, Sheffield, Gloucester, Plymouth, Nottingham, York, Northampton. There are others.

**The French Book Store in Berlin** has announced that it corresponds in Esperanto as well as in German and French.

**Marriage via Esperanto** is no longer considered something extraordinary, but we should like to mention at least one of the most recent additions to the list: An Egyptian engineer, Mohamed Joussef, married Miss Rosa Strobbe, of The Hague, Netherlands, with whom he had carried on an inspiring (obviously!) pen friendship in Esperanto. The wedding was celebrated in Alexandria, Egypt, on May 25, 1954.

## MAUCH CHUNK - JIM THORPE

**S**endube multaj personoj inter la usona Esperantistaro povas memori, okaze de la pasintaj EANA kongresoj, ke ili renkontis junulon, kiu venis de urbeto kun la nomo *Mauch Chunk*. Kiel facile tiu nomo kondukis al interparolado! Kaj tuj venis la informo, ke jes, ĝi estas indiana nomo, kiu signifas "Urso Monto" pro tio, ke unu el ĝiaj ĉirkaŭaj montoj similas al kuŝanta urso. Tio estis laŭ la ruĝhaŭtula vidpunkto kaj ŝajne ili posedis pli da imagopovo ol la blankuloj.

Ja, antaŭ kvindek jaroj Mauch Chunk estis bone konata urbeto. Ĝia natura pejzaĝo en la belaj montoj "Pokono" kaŭzis, ke oni nomis ĝin "La Svislando de Usono". Krome, ĝi posedis eble la plej malnovan fervojon en Usono, la "Switchback", kiun oni uzis por transporti la nigrajn diamantojn (karbon) de la minejoj al la riverkanalo kaj de tie al la grandaj urboj.

Sed nun, la nomo Mauch Chunk forpasas en la historion. Kaj nova nomo sin prezentas sur la landkarto de Pensilvanio. Tiu nomo estas *Jim Thorpe*.

Certe la nomo de James Francis (Jim) Thorpe ne estas nekonata al la plimulto de legantoj de *Amerika Esperantisto*. Ĉiu scias, ke li estis unu el la plej grandaj atletoj iam aperintaj en Usono. Li estis indiano de la tribo "Sac-Fox" kaj naskiĝis en Oklahoma. Lia patrino donis al li la indianan nomon *Wa-Tho-Huck*, kio signifas "Brila Vojeto". En sia junaĝo li venis al Carlisle, Pensilvanio, por ĉeesti la tiean indianan lernejon kaj tie komenciĝis lia meteora supreniro en la mondo de sporto.

Jim Thorpe estis natura atleto. Kiun ajn sporton li komencis lerni, en tiu li preskaŭ tuj superis. Sensacio li fariĝis en la sporta mondo. Sed estis ĉe la Olimpiaj Ludoj en Stokholmo en 1912, kie li montris al la tuta mondo sian atletan kapablon gajnante multajn ludojn en konkurso kun la plej bonaj atletoj el ĉiuj mondpartoj. Ne estas do mirinde, ke la sveda reĝo manpremis lin kaj diris: "Sinjoro, vi estas la plej granda atleto en la mondo". Pli poste li daŭrigis sian sportan karieron sur profesia kampo. Ankaŭ tie li superis dum multaj jaroj. Eĉ hodiaŭ la nomo de Jim Thorpe troviĝas alte en la kronikoj de usona sporto, lando de multegaj elstaraj sportuloj. Antaŭnelonge la Associated Press nomis lin la plej granda atleto de la duona jarcento.

Kiam Jim Thorpe mortis antaŭ kelkaj jaroj lia vidvino serĉis por taŭga restadloko por li. Tute hazarde ŝi vidis sur televido la urbeton Mauch Chunk. Plaĉis al ŝi la bela pejzaĝo kun la indiana nomo. Kaj, ĉu ne estis en la ŝtato Pensilvanio, kie li unue famiĝis pro siaj atletaj venkoj?



JIM THORPE

Culver



Inkognite ŝi vizitis Mauch Chunk kaj estis tuj ĉarmita pri la loko. Poste ŝi prezentis sin kaj esprimis sian intencon enterigi la korpon de sia edzo en tiu loko. Unu solan kondiĉon ŝi petis—ke oni ŝanĝu la urbnomon al “Jim Thorpe”.

Antaŭnelonge tio okazis. En speciala elekto oni decidis, ke de nun Mauch Chunk kaj East Mauch Chunk fariĝos unu urbo, iom pli ol ses mil personoj, kun la nomo *Jim Thorpe*. Parenteze, dum multaj jaroj oni sen-sukcese klopodis unuigi la du apartajn urbetojn, sed necesis la spirito de usona indiana atleto por tion efektiviĝi. Sed tio estas nur unu rezulto. Oni jam komencis planojn por konstrui klinikon kun la celo kontraŭbatali kanceron kaj kormalsanon, pro kiuj malsanoj Jim Thorpe mortis, kaj konstrui hospitalon kiu helpos al la viktimoj de la nomitaj malsanoj.

El ĉi tiu mallonga skizo estas evidente, ke Jim Thorpe ne estos enterigita kaj forgesita. Lia nomo vivos kaj la laboro de la proponita kliniko kaj hospitalo certe helpos al multaj personoj en estontaj jaroj kaj estos vivanta memoraĵo honore kaj omaĝe al unu de niaj plej grandaj atletoj.

—*William P. Vathis*

---

## ESPERANTA KRONIKO

**Gesinjoroj R. E. Holland**, Naperville, Ilinojo, pasintan vintron komencis Esperanto-kurson por lernantoj en la altlernejo. Nun, je la komenco de la nova lernej-periodo, la afero kreskas, kaj studentoj en la Nord-Centra Kolegio montras intereson pri Esperanto. Gesinjoroj Holland ĉeestis la kongreson en Nov-Jorko en Junio, kaj aktive partoprenis en ĝi. S-ino Holland venis spite de rompita kalkano, kio necesiĝis uzon de lambastonoj.

**Donald W. Hathaway** de la Hadley-Lernejo por Blinduloj raportas: “Nia koresponda kurso de Esperanto iĝas pli kaj pli populara. Alvenas leteroj el ĉiuj partoj de la mondo. Parolante pri la Lernejo Hadley, oni preskaŭ ĉiam mencias kun fiereco nian ‘kurson de Esperanto’. Ĝi jam estas daŭra ero de nia programo”.

**La Esperanto-Asocio de Nov-Jerzio** sukcesis organizi por la nova sezono multajn Esperanto-kursojn en Lernejoj por Plenkreskuloj. Jen listo de lokoj kie okazas tiuj kursoj kaj nomoj de la instruistoj: *Morristown, J. Henry Kruse; Elizabeth, S-ino Rubey P. Kelber; Cranford, Pauline Ziobro; North Newark, John Salles; Verona, Elsie Yunghans; East Orange, Don Walton, Orange, S-ino Leslie Davis.* Gratulon!

**Radio Stacio KFI**, Kalifornio, ofte mencias Esperanton en la programo de Ben Hunter. Li nomas sian programon “La Alia Parto de la Tago” aŭ “Noktaj Strigoj”, ĉar ĝi okazas en la frua mateno de la unua ĝis la kvina horo. S-ro Hunter jam donis la adreson de EANA por informpetoj kaj sciigon pri la klubo en Los Angeles.

**La ĉefaj filatelaj organizoj** de Kubo kuniĝis por festi la unuan centjaron de la Kuba Poŝtmarko per starigo de Internacia Filatela Ekspozicio dum Aprilo 1955. La *Kuba Esperanto-Asocio* estas reprezentata en la organiza komitato. Cirkuleron en Esperanto oni eldonos tuj kiam la komitato aprobos plenajn detalojn pri la ekspozicio.

## BONVENON HEJME DE HARLEMO

Gesinjoroj Connor, karaj amikoj:

Unue: Bonvenon hejme de Harlemo! Mi anticipas legi plenan raporton pri via vojaĝo kaj pri la Kongreso en baldaŭna eldono de AE. Estas mia plezuro samtempe raportii, ke de post la Majo-Junia numero de AE venis kontribuoj al la Fondaĵo "Gekonoroj-al-Harlemo" de la sekvantaj personoj: *Francis Ballard, M. Whipple Bishop, J. Leo Chapman, R. L. Denison, Lillian Fuller, Austin Herschel, David Jagerman, Eulalia & Sidney Marks, Ivy K. Reed, Mazah Schulz, S-ino S. T. Sampson, James Sorrel, Herman Tobusch, Adeline Vigelis, Virgil Whanger*. La tuta sumo kolektita nun staras je \$447.46. Tre koran dankon al ĉiuj!

Due: Mi devas rakonti al vi pri unu el la specialaj plezuroj de mia ses-semajna vizito dumsomere al Sud-Ameriko. En Rio de Janeiro, Brazilo, mi havis la grandan plezuron renkonti, okaze de edziĝfesto de lia nevino, nian 93-jaran "junan" samideanon, *D-ron Carlos Schalders* el São Paulo. Li ekvidis la verdan stelon en mia butontruo, kaj ni tuj fariĝis plej bonaj amikoj.

Ĉe la edziĝofesteno, kiel patriarko de la tuta familio, D-ro Schalders devis paroladi. Li komencis portugale, sed tuj klarigis, ke honore al la honorgasto (mi), kiu venis 5000 mejlojn per aviadilo por ĉeesti, li intencas daŭrigi Esperante. Kaj tion li faris! Mi supozas, ke la pli ol ducent aliaj gastoj komprenis preskaŭ ĉion, kion li diris, ĉar poste ili ĉiuj vigle aplaŭdis lin.

En freŝdata letero de D-ro Schalders, mi ricevis tradukon Esperante de portugala poemo. Se vi povos presi ĝin mi estas certa, ke viaj legantoj ĝuos ĝin.

Tutkore via, *HORACE C. JENKINS*

---

### *Mi Havas Ankoraŭ Patrino* (*Tenbo Ainda Mãe*)

Mi aŭdas ilin diri ke mia patrino mortis,  
Kaj—afere aparta—mi ne prilamentas.  
Estu de multaj homoj al mia sento kontraŭo,  
Oni juĝu min filo senkora, ateisto...

Patrino! Kiam al via tombo miaj okuloj malleviĝas,  
Mi ne vidas tie la nigran vualon de la morto;  
Se via korpo el polvo al polvo reiris,  
Via animo la ĉielon kuras sen malhelpo.

De la mondo kie ankoraŭ regas la tiraneco,  
Volis la Patro al vi doni leteron de libereco.  
—Premion, patrinjo, pro multo kion vi suferis!

Kaj, via filo, kiun ĉiam vi tiom amis,  
Ne sin sentas orfo, nek sin submergas en ploro,  
Ĉar, al li, patrino, vi ne mortis.

—el portugala tr. *CARLOS SCHALDERS*

# The Esperanto Association of North America

---

## UNITED EFFORTS NEEDED FOR THE JUBILEE YEAR

AS announced in the May-June issue of AE, plans are going forward for the grand Golden Jubilee Year of FANA. We have suggested that you send in the names of pioneer and longtime members for the *Honor Roll* of the Jubilee Year, and reminiscences of their activities in the early years of our Esperanto movement. We plan to print a special issue of AE, and desire suggestions for making it the best ever. One suggestion received is that we design a special Golden Jubilee green star button to be given freely to all EANA members during 1955. Another is to provide a beautiful certificate to all such members. There are many splendid things we can do to make 1955 a memorable year.

Believing that "*Unueco estas forto*", we ask your active participation and support in this endeavor. In the face of growing opposition from Interlingua, and difficulties with radical attempts to divide us, we must all get together to organize for unity in one strong American movement. *With your help, it can be done.* Send in your suggestions *now*. Let's frankly discuss all the possibilities.

---

*Novaj Membro-Patronoj de EANA:* Specialan dankon al la sekvantaj personoj, kiuj antaŭnelonge renovigis sian membrecon en EANA en la kategorio de Patrono: *Angela Alfaroli, Eugene Beck, J. Leo Chapman, James C. Faughnan, Mabel G. Hamilton, Fred H. McMann, Russell H. Rausch, Herbert W. Smart, F. Lee York.*

*Ekstraj donacoj al la Subtena Kaso* depost Aprilo 1954: *A. F. Myers \$7, J. Vidack \$2, E. Marks \$2, I. Boone \$1, Wm. P. Vathis \$2, A. H. Stevens, W. D. B. Hackett, J. H. Schackmann.* Tre koran dankon.

*Sukcesojn en la kampanjo "Ĉiu Membro Varbu Unu Novan Membron"* ni registras lastatempe por la jenaj personoj: *J. H. Schackmann (1), S. M. Williams (2), Donald Walton (3), Henry Kruse (1), J. H. Hartley (1), Ivy K. Reed (1), Sr. M. Theophane (1), Horace Jenkins (1), H. E. Dillinger (1), Pastro Gabriel Pausback (14), Richard Vineski (15).* Gratulon kaj dankon!

*"Amerika Esperantisto" en Bibliotekoj.* Sinceran dankon al la sekvantaj membroj, kiuj subtenas la kampanjon por meti AE en bibliotekojn tra la lando: *Angela Alfaroli (2), Wm. P. Vathis (3).* Jen alvoko por donacantoj por la sekvantaj bibliotekoj: *Universitato de Toronto, Universitato de Indiano, Northwestern University kaj John Hopkins University.* Speciala prezo por AE kiel donac-abono estas po \$1.50 aŭ 10 por \$10.

*Dankojn ni esprimas al S-roj S. Docal kaj I. Grosman* pro la diversaj fotoj de la 44a Kongreso, presitaj en la pasinta numero de AE.

*Pardonu la eraron!* En la artikolo de *Babi Le Mulo* (vidu AE Jul-Aŭg., p. 59) estas eraro, ke la pasinta kongreso de EANA estis la 39-a. Kompreneble, ĝi estis la 44-a, kiel priskribite aliloke.

## MORTO DE ERNEST DODGE

Ernest Green Dodge, unu el la plej konataj usonaj Esperantistoj kaj dum 9 jaroj membro aŭ estro de la Aga Komitato de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, mortis 84-jara la 28-an de Aŭgusto 1954 en Brad-dock Heights, en la ŝtato Maryland. La ĵurnalo *Washington Post and Times Herald*, publikigante detalan nekrologon pri li kun foto, atentigis speciale pri lia Esperanto-agado.



Naskiĝinte en la ŝtato Michigan, Ernest Dodge akiris universitatajn diplomojn de Berea College en Kentucky (B.A.) kaj de la Universitato de Chicago (M. A.) kaj estis dum multaj jaroj instruisto en lernejoj kaj profesoro en kolegio, instruante la grekan lingvon kaj diversajn aliajn fakojn, ekzemple geodezion. Poste, komencante en la Unua Mondmilito, li estis dum multaj jaroj registara oficisto en Washington. Lia lasta ofico estis tiu de ĉefekzamenisto en la Komisiono pri Registaraĵ Oficistoj (*U. S. Civil Service Commission*).

Ernest Dodge interesiĝis pri Esperanto en 1906 kaj lernis la lingvon en 1910. Sed dum multaj jaroj li ne estis aktiva. Nur en 1933 li fervore komencis labori en la Esperanto-movado kaj en EANA, gvidante kursojn, partoprenante en la Esperanto-Klubo de Washington, tradukante literaturajn verkojn, verkante artikolojn en angla lingvo pri Esperanto kaj en Esperanto pri literaturaj, sciencaj kaj filozofiaj temoj. Lia verketo *Flugado Alimonden* aperis en Nederlando en 1938. Multajn artikolojn li verkis por *Amerika Esperantisto*, *Scienca Gazeto* kaj aliaj revuoj. Dum multaj jaroj li sindone estris la Libro-Pruntservon de EANA. Li varbis eminentulojn por subskribi la Petskribon al la Unuigitaj Nacioj. Li estis membro de la Subtena Komitato de EANA de ĝia fondo ĝis sia morto. Lia plej grava anglalingva libro, *Bold Thoughts on Life* (Kuraĝaj Pensoj pri la Vivo), 310-paĝa, aperinta en Boston en 1951, ankaŭ enhavas efikan propagandon por Esperanto.

La Esperanto-movado kaj EANA ŝuldas multon al S-ro Dodge kaj neniam forgesos lian laboremon kaj helpemon. Al lia edzino kaj filino ni esprimas sinceran kondolencon.

---

*Noto pri antaŭmorta deziro de Ernest G. Dodge:* Nur iom pli ol du monatoj antaŭ la morto, en Junio, S-ro Dodge proponis, ke li helpu al la subteno de EANA per disdonado de 200 ekzempleroj de lia ĉefa verko "Bold Thoughts on Life" (bone bindita libro, 310-paĝa). Estinte konstanta kaj malavara subtena membro de EANA ekde sia aliĝo al la organizo, li deziris instigi aliajn membrojn pli forte subteni finance al EANA. Li deziris pli da novaj membroj, pli da realiĝoj de malnovaj membroj, kaj pli da subtenaj membroj. Lia plano estis por donaci *senpage* la libron al ĉiu membro (nuna, nova aŭ malnova) kiu pagus kotizon al EANA en pli alta kategorio ol la minimuma. Ni mencias tiun planon nun, kaj sugestas, ke ni ĉiuj penu plenumi lian deziron – kaj ke ni faru tion honore al lia memoro.

## ESPERANTA KRONIKO

**C. C. Cummingsmith, S. M.**, Honolulu, Havajo, raportas pri kreskanta intereso pri Esperanto en Havajo, speciale pri planoj por kurso ĉe la insulo Maŭio (Maui). Sukceson al tiuj klopodoj!

**Inter nia Esperantista familio:** Geedziĝis en Nov-Jorko la 4an de Junio, du junaj membroj de la loka Nov-Jorka grupo, *Harry Harrison* kaj *Joan Merkler*. Al *David* kaj *Adrienne Jagerman*, Nov-Jorko, la 14an de Majo, naskiĝis filino *Diane Ellen*, kiu laŭ la fiera patro estas jam burĝonanta Esperantistino. Al *Donald* kaj *Esther Hathaway*, Ilinojo, la 21an de Junio, naskiĝis nova filino *Charis Esther*. Al *Andre* kaj *Madeleine D'Avi*, Nov-Jorko, la 7an de Oktobro, naskiĝis filo *Charles Bertrand*.

**Turka studento, Y. Gulsoy**, antaŭe aktiva en la Esperanto-Klubo de Vancouver, Kanado, informas nin, ke li translokiĝis al Toronto, kie li nun laboras profesie en la tiea universitato.

**La Esperanto-Klubo de Washington, D.C.**, prezentis specialan premion (\$25 U.S. Savings Bond) al *F-ino Troy Hambricht*, gajninto en konkurso sub aŭspicio de la klubo. La tezo de *F-ino Hambricht* titolita "Traborante la Lingvajn Barojn" (Piercing the Language Barrier) priparolis la lingvan problemon kaj proponis la universalan lingvon Esperanto kiel praktikan solvon de la afero.

**Eksterlandaj vizitantoj** al la Centra Oficejo lastatempe estis: *D-ro Hideo Yagi*, konata ginekologo el Japanujo; *Manuel Certad Paredes* el Venezuelo; *Aristoteles Juvenal de Faria Alvim* el Brazilo; kaj *Frato Leonardo Morizio Domingues* el Argentino.

**Esperanto-Societo de Milwaukee** nove fondiĝis la 2an de Septembro. La Societo konsistas el studrondoj kaj unuopaj Esperantistoj, kaj decidis kunveni proksimume ĉiumonate. Oficistoj de la nova grupo estas: *Jarvis E. Bush*, Prezidanto; *Tony Nabby*, Vic-Prezidanto; *Jon B. Willarson*, Sekretario; *F-ino Cecile Pollatz*, Kasisto. Gratulon kaj sukceson!


**Gesinjoroj Edwin Sievers**, Detrojto, Miĉigano, denove disponas sian gastaman hejmon por kunvenoj de la loka klubo dum la sekvonta sezono. Komencante la 19an de Oktobro, la kunvenoj okazos dufoje monate – la unuan kaj trian mardon de la monato, vespere je la oka.

**Inundo de informpetoj** rezultis el la enmeto en ĵurnaloj dum la somero de diversaj leteroj al la redaktoroj. Plej sukcesaj el vidpunkto de la nombro da informpetoj kaj rezultaj novaj membroj por EANA, estis tiuj de *Richard T. Vineski* kaj *Pastro Gabriel N. Pausback*. S-ro Vineski aperigis leterojn kun nomo de EANA en multaj ĵurnaloj tra Usono, ekzemple: *New York Herald Tribune*, *St. Paul Dispatch*, *Buffalo Evening News*, *Sacramento Bee*, *Boston Globe*, *Detroit Times*, *Oakland Tribune*, *Binghamton Sun*, *Vallejo Times Herald*, kaj multaj aliaj. Pastro Pausback enmetis longan artikolon en la Katolikaj gazetoj *Catholic Register*, *Sunday Visitor* kaj *New World*. Aliaj leteroj aŭ artikoloj aperis en la jenaj ĵurnaloj: *Stamps*, kun redakcia noto kaj bildo de la nova aŭstra Esperanta poŝtmarko; *The Centre Islander*, Toronto, Kanado, verkita de *W. D. B. Hackett*; kaj *Western Stamp Collector*, skribita de *I. K. Reed*.

## NIA VOJAĜO TRA ESPERANTUJO

Doris kaj Alan Connor

*"Per altvojo vi, kaj per malalta mi,  
Kaj unue Skotlandon ni venos."*



Unu el niaj vojaĝceloj estis la urbo Edinburgo, Skotlando. Post unu semajno en Londono, kie ni trovis nin en la mezo de multaj konferencoj kun estroj de la Brita Esperanta Asocio, kaj kie ni ĝuis la gastamecon de la Prezidanto de BEA, S-ro Gething kun lia ĉarma edzino, kaj komencis kompreni la skotan bonhumoron de la Sekretario de BEA, S-ro Leslie, ni estis survoje per vagonaro al Internacia FERIA Semajno Esperantista en Skotlando. Kiam ni alvenis al Edinburgo en la stacidomo jen staris sinjoro kun la verda stelo por bonvenigi nin. Almenaŭ tion ni opiniis, ĝis ni vidis, ke post ni venis aliaj — du instruistinoj el Finnlando kaj sinjorino el Glasgovo. Ni ĉiuj marŝis kune al la sidejo de la Edinburga Klubo ne tro distance for, kaj tie inter multaj aliaj atendis la alvenon de aŭtobuso. Dum ni atendis ni plezure renkontis malnovajn amikojn, kiuj memoris nian viziton en la jaro 1937 kun Esperantista karavano el Usono.

Baldaŭ la aŭtobuso alvenis. Ni ĉiuj gaje enbusiĝis kaj veturis al trege interesa loko preskaŭ sep mejlojn for de Edinburgo, al la tiel nomata *Newbattle Abbey*. *Newbattle Abbey* estas impona domo, konstruita sur ruinoj de malnova abatejo, fondita en la jaro 1140. Ĝi estis la hejmo de Lordo Lothian, ambasadoro de Grand-Britujo al Usono dum la milito. Lordo Lothian, laŭ la vortoj de lia malnova servistino, "tre amis Amerikanojn". Post la milito li donacis la domon al la urbo por fari el ĝi kolecion por plenkreskuloj. La Esperantistoj de Edinburgo luis la lokon por somera feria semajno. Ĉeestis Esperantistoj el Finnlando, Anglujo, Germanujo, Svedlando, Nederlando, Belgujo, Danlando, Usono kaj Skotlando.

Speciale memorinda por ni estis la *Vespero Burns* (elparolu Bur-r-r-nz), festo celebrata de la skotoj kutime en Decembro, sed speciale aranĝita por ni. Ĝi estas, kompreneble, honora festo al la fama poeto *Robert Burns*. Oni deklamas liajn poemojn, kantas liajn kantojn, tostas la "Laddies" (sinjorojn) kaj la "Lassies" (sinjorinojn) kaj "la gastojn". Oni festenas per speciala skota manĝaĵo *haggis* (haggis), kiu estas bongusta miksaĵo de hepato, aveno kaj graso. Ĝi estas enkondukata per impona sakfajfilisto, kiu ĉirkaŭmarŝas en la ĉambro kaj al kiu oni danke donacas glaseton da bona skota viskio!

La plej elstara impreso de la semajno estis la ĉeesto de Esperanta koncerto, prezentita de lernantoj de elementaj lernejoj en la konteo Midlothian. En tiuj lernejoj nuntempe okazas tre interesa eksperimento pri Esperanto. Elektita grupo de 180 lernantoj lernis Esperanton dum 10 semajnoj sub aŭspicio de la Eduka Komitato. La lernantoj poste studos la Francan lingvon. Preciza esplorado dum 5 jaroj pere de instruistoj kaj la Skota Konsilantaro por Eduka Esploro montros ĉu la lernantoj, kiuj studis Esperanton, pli facile lernos la Francan lingvon ol alia kontrolita grupo,

kiu ne lernas Esperanton. Oni ne fanfaronas pri Esperanto pro ĝi mem, sed la sekretario de la Eduka Komitato mem lernis la interlingvon kaj ĉeestis ofte dum la feria semajno. Partoprenis en la koncerto 150 lernantoj el la Esperantaj kursoj. Por ni ambaŭ, estis vere kortuŝe aŭdi tiujn junajn voĉojn kanti en belega Esperanto kaj prezenti simplajn teatraĵetojn en la interlingvo.

De Skotlando ni vojaĝis al Nederlando, al la ĉarma urbeto Haarlem, loko de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto (31 Julio-7 Aŭgusto). Kiam ni alvenis, en la stacidomo atendis nin gvidantoj por konduki nin al hoteloj, pensionoj, gastejoj – ĉio plenplena dum tiu semajno de pli ol 2000 Esperantistoj el 28 landoj. Esperanta flagego gaje flirtis de la supro de ĉiu aŭtobuso, kaj ni ŝerce flustris inter ni: "Jen, la verduloj kaptis la urbon! La verda revolucio komenciĝas!"

Mirinde bele la suno brilis dum la tuta kongresa semajno. En tiu lando de ofta pluvado tio estis miraklo en si mem! Vagante tra la stratoj de Haarlem, ni forte sendis la intiman gajan atmosferon de la urbeto. Verdaj standardoj flirtis ankaŭ ĉe fenestroj kaj pordetoj de butikoj kaj ĉefe en la mezo de la granda Urba Placo. Menuoj en Esperanto troviĝis en preskaŭ ĉiu restoracio. Bonegaj manĝaĵoj kiel "Amerika bifstekoj kun frititaj terpomoj" kaj ekzotikaj manĝaĵoj el Indonezio allogis nin al provo. Sed speciale allogis nin la malaltaj prezoj. Ekzemple, por bona peco de bifstekoj kun kvar pecoj de buterpano la prezo estis nur 40 cendoj. Vespere sonoriloj de la Granda Preĝejo disaŭdigis Esperantajn melodiojn.

La Interkona Vespere sabate vespere okazis en unu el la imponaj ĉambregoj de la Kongresejo. Granda elektra iluminaĵo en formo de verda stelo flagris ritme sur la fasado de la konstruaĵo. Interne estis amaso de Esperantistoj, kiuj vagis, sidis ĉe tabloj, babilis, trinkis, manĝis. Ĉiun duonhoron sonorilo sonoris kaj la regulo estis, ke oni devas ŝanĝi sian sidlokon. Nu, okazis ke preskaŭ ĉiufoje ni ne ŝanĝis nian lokon, sed simple atendis la alvenon de novaj personoj al nia tablo. Tiel ni feliĉe interbabilis kun diversnacianoj.

La inaŭguro de la 39-a Kongreso okazis en vere tropika klimato! La grandega salono estis dekoraciita per miloj da floroj kaj palmarboj, kaj tra la vitra tegmento la brilantaj radioj de la suno penetris por fari el la ĉambrego veran tropikan insulon. Komforte ĝi tute ne estis. Fakte dum la programo unu sinjoro ŝvenis, kio kaŭzis grandan ĉagrenon por la gvidantoj. Tamen, ni ĉiuj devis toleri la varmegon, kaj baldaŭ forgesis nian malkomforton pro la streĉa atento al la prelegantoj.

La Ĉef-Ministro de la Nederlanda registaro, D-ro Willem Drees, alparol-

*Ĉe la gaja Interkona Vespere de la 39-a Kongreso, maldekstre sidas Doris kaj dekstre staras Alan.*



is la Kongreson en flua Esperanto. (Li lernis nian lingvon jam antaŭ multaj jaroj.) Same faris la urbestro de Haarlem, S-ro Cremers, en sia bonveniga saluto. Dek-unu registaraj reprezentantoj prezentis oficialajn salutojn al la Kongreso. Okazis skandaleto, kiam la Legacia Sekretario de Aŭstrujo komencis paroli en la germana lingvo. Kelkaj aŭdaculoj subite kriis "ne parolu" (se vi ne povas paroli Esperante). Aliaj silentigis ilin.

Poste salutis la Kongreson reprezentantoj de Landaj Asocioj. Por la Esperantistoj de Usono kaj Kanado, en la nomo de EANA parolis S-ino Connor, rikoltante viglan kaj daŭran aplaŭdon.

La festparoladon faris D-ro Edmond Privat, Honora Prezidanto de UEA. Estis la unua fojo, ke ni aŭdis D-ron Privat oratori, kaj kvankam li mem ne plu estas juna, lia voĉo konservas la junecan forton kaj povon, kaj li majstre prezentis siajn inspirplenajn ideojn.

La tuta semajno estis plenplena de kunvenoj, konferencoj, prelegoj, ekskursoj kaj amuzaj aranĝoj. S-ro Connor devis ĉiutage partopreni longajn kunsidojn de la komitato de UEA, kie li funkcias kiel reprezentanto de la Landa Asocio EANA. Ni renkontis multajn malnovajn amikojn, kaj speciale ni atentis pri interdiskuto kun estroj kaj gvidantoj de frataj landasocioj kun la celo plifirmigi la rilatojn inter landasocioj per interkonsiliĝo pri organizado, informado, ktp.

Dum unu el la Ĝeneralaj Kunsidoj de la Kongreso estis pritraktata la temo *UNESCO kaj Esperanto*. El la sciigoj oni devas konstati, ke UEA ne anticipas grandan sukceson por Esperanto de la Konferenco en Montevideo. Tamen estis tendenco emfazi la propagandan efikon de la pasintjara kampanjo tiucele, kaj ankoraŭ esperi pri minimumaj rezultoj.

Ĉeestis la Kongreson aliaj membroj de EANA kun kiuj ni ofte interbabilis: *D-ro F. W. Breth* el Pensilvanio, *J. Gamble* el Konetikuto, *Ges-roj F. Faulkner* kaj *D-ro & S-ino R. Lewin* el Kanado.

Ni nur menciuj, ke post la Kongreso ni veturis al la Esperanto-Hejmo en Baden-Baden, Germanujo, kaj tie restis dum unu semajno. S-ino Miller, la posedanto, estas tre bonkora mastrino. La gasthejmo situas en tre bela loko. Ĉeestis samtempe Esperantistaj paroj el Italujo kaj Saarlando. Do, ni denove estis en Esperanta familio, kaj ni diskutis pri ĉiuj problemoj de la mondo!

Post Baden-Baden ni decidis esplori la nove instalitan Esperantan kastelon "Grésillon" proksimume 5 horojn sude de Parizo. Tie ni trovis interesege lokon, grandan kastelon kun bela ĉirkaŭaĵo. Esperantistoj en Francujo aĉetis la kastelon pasintjare, kaj nun aranĝas kursojn, konferencojn, ktp. Kiam ni estis tie okazis kurso por gejunuloj kaj instruistoj. La atmosfero estis tre gaja. Ni multe babilis kaj kantis, sed ĉiutage de la 9-a ĝis la 12-a horo okazis seriozaj kursoj.

Post Grésillon, ni vojaĝis al Parizo, kie denove ni konferencis kun estroj de la franca movado, kaj ĉeestis unufoje la tiel nomatan *Esperanto-Kabaredon* en la kvartalo Montmartre. Ĉiusemajne Esperantistoj renkontiĝas en malgranda drinkejo. La atmosfero estas ĉiam gaja, bonhumora, kaj ni diru, ofte "spica".

Ni multe laboris, multe vizitis, kaj multe ĝuis la vojaĝon al Eŭropo. Al ĉiuj, kiuj tiel bonkore helpis al ni fari tiun rondiron tra Esperantujo ni elkore dankas, kaj deziras diri, ke nun post la streĉa vojaĝado ni tre ĝojas esti denove inter nia propra Nord-Amerika Esperantista familio.



## MORTO DE FLORA McINTIRE WYMAN



Flora McIntire Wyman, kiu dum preskaŭ duona jarcento estis fervora Esperantistino kaj konstanta subtena membro de EANA, mortis la 31an de Majo 1954 en hospitalo proksime al sia hejmo en Melrose, Florida. Nur la antaŭan tagon ŝi estis hejme kiel kutime, sed ŝi sentis sin malforta kaj tre laca. Ŝi havis 89 jarojn de aktiva kaj meritplena vivo, kaj tiam ŝi trankvile pasis en eternan ripozon. Enterigo okazis en North Abington, Massachusetts, kie la familio Wyman loĝis dum multaj jaroj.

S-ino Wyman, vidvino de Windsor H. Wyman kiu mortis en 1935, naskiĝis kiel Flora Alma McIntire la 26an de Februaro 1865 en la kabano konstruita el ŝtupoj de siaj pioniraj gepatroj, kiuj luktis kun la sovaĝa lando de Konteo Aroostook en la norda parto de la ŝtato Maine. Jarojn poste la familio fariĝis tre sukcesaj kaj konataj kultivistoj de arboj kaj aliaj plantaĵoj. Pro tiu sperteco, la hejmo de S-ino Wyman en Florida estis mirinde bela ĝardeno de fruktoj, floroj, kaj kreskaĵoj. Tie dum la lastaj jaroj, la filino kaj bofilo, Rachel kaj Elbridge Cann, loĝis kun la patrino por ami prizorgi ŝin.

Dufoje, en la jaroj 1953 kaj 1954, ni – Doris kaj Alan – vizitis tiun ĉarman hejmon de nia "Patrineto". Ni nomis ŝin tiel, kaj ŝi subskribis leterojn same, depost la EANA-Kongreso 1946 en Conway, New Hampshire. Tie ŝi rimarkis ke ni estis tre lacaj (Doris eĉ iom malsana pro la laborego), kaj ŝi insistis, ke ni akompanu ŝin al ŝia somera hejmo en la ŝtato Maine por kelkaj tagoj de ripozo kaj resaniĝo. Pri nia vizito al "Patrineto" en Florida, legu la artikolon kun foto, poemo, kaj priskribo pri ŝia Esperantista vivo, titolita *Rememoroj pri Florido, Vizito al Flora Wyman, Pioniro de Esperanto*, en la Marta-Aprila numero de AE, 1953.

Pro tiu iom detala artikolo en 1953 pri la Esperantista vivo de S-ino Wyman, ni nun nur skizas kelkajn elstarajn punktojn. Flora Wyman kun intereso legis pri Esperanto antaŭ la komenco de la nuna jarcento. Ŝi fariĝis membro de EANA en 1908, kaj tuj komencis kompetente praktiki la interlingvon. Dum multaj jaroj ŝi instruis Esperantajn kursojn. Ŝi ĉeestis la Universalan Kongreson en Washington, D. C., 1910, kaj multajn EANA-Kongresojn poste. Ŝi ĉiam kontribuis malavare kaj ofere al sia EANA, kaj estis konstanta membro de la Subtena Komitato ĝis sia morto. Pro sia profunda religia sento, ŝi ne kontentiĝis pri nura financa donacemo, sed ĉiam aktive partoprenis en la movado. Ŝi diris: "Vi ne donas multon, se vi ne donas parton de vi mem." S-ino Wyman estis plej alta ekzemplo de sindona kaj lojala Esperantisto.

Ĉiuj kiuj konis S-inon Wyman neniam povas forgesi ŝin. Kaj la Esperanta movado ĉiam honoros ŝin en la historio de EANA. En la familio Wyman estas multaj kiuj interesiĝis pri Esperanto, kaj iuj estis membroj de EANA: Rachel kaj Elbridge Cann, Donald Wyman, S-ino Arthur (Florence) Calkins, Richard Wyman. Al ĉiuj postrestantoj de "Patrineto" ni esprimas sinceran kaj simpatian kondolencon.

– Doris & Alan Connor





## DEZIRAS KORESPONDI

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

- Argentino.** Luis Iribarne, Callao 500 - 2<sup>o</sup>, Buenos Aires. Dez. kor.  
**Argentino.** Profesorino Matilde Laurenza, Vieytes 99, Banfield FCGR.  
 Junaj gelernantoj deziras korespondi.
- Germanujo.** Gabriele Wagner, Schumannstrasse 65, Frankfurt/Main. 18-jara, deziras korespondi kun gejunuloj en la tuta mondo.
- Hispanujo.** Johano Amorin, Lauria 67, Tarrasa. Dez. kor. kun Usonanoj.
- Italujo.** Virgilio Maccario, Cirso Giulio Casare 23 bis, Torino. Juna oficisto dez. kor. kun ĉiuj landoj per bildkartoj, kaj interŝ. PM.
- Japanujo.** F-ino Secuko Jamasita, 41 Neribeityō Hukuoka-si. 20-jara, deziras korespondi pri kino, muziko, montgrimpado.
- Nord-Irlando.** F-ino Mary Thorpe, 36 Woodvale Rd., Belfast. 25-jara komercanto deziras korespondi.
- Nederlando.** J. Moll, Begijnkade 2, Utrecht. Ŝatas interkorespondadon pri Irlando - lando kaj popolo. Korespondemuloj de Irlando kaj aliloke pri tiu temo tutcerte ricevos respondojn.
- Svedujo.** S-ino Lilly Linnarsson, Vänskapsvägen 38, Stora Essingen, Stockholm. 35-j. kontoristino dez. kor. pri landoj, popoloj, PM ne!
- Aŭstralio.** C. Walter, Loombah, Cummock, N. S. W. Komercanto deziras korespondi, interŝangi PM kaj unuataĝajn kovertojn.
- Germanujo.** Esperantista Rondo, Hauptstr. 62, Lauterbäcken-Pfalz (22b). 10 gejunuloj (15, 16, 17 & 20 jaraj) deziras korespondi kun junuloj.
- Usono.** Ĉu vi bezonas presajojn? Vi povas akiri senpagan klišon kaj pagos specialajn prezojn starigitajn por Esperantistoj. Skribu al: S-ro Joseph G. Wekerle, 712 E. Georgia St., Indianapolis, Indiana.
- Polujo.** Alfred Muszer, Aleja Stalina 32, Chorzow I. Deziras korespondi kun Usonanoj, pri parapsikologio, okultismo, kaj spiritismo.

### EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1955

The Central Office has enjoyed serving the members of EANA during the past year. It is now time for many of you to renew your membership for 1955.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "associate membership" in the international association UEA. You receive coupons (called "membromarkoj") of UEA, and have a right to services of delegates throughout the world.

In addition there are "individual membership" categories in UEA: the *Yearbook* (containing lists of delegates) is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually.

Now is the time for you to renew your membership in your North American association EANA, and in the general international association UEA. Here are the combined membership rates for 1955:

	<i>Armed Forces, H.S. &amp; College</i>	<i>Active Member</i>	<i>Patron Member</i>
EANA Membership & associate of UEA:	\$3.00	\$5.00	\$10.00
EANA Membership & <i>Yearbook</i> of UEA:	\$4.25	\$6.25	\$11.25
EANA Membership with <i>Yearbook</i> and magazine <i>Esperanto</i> of UEA:	\$6.00	\$8.00	\$13.00

## NEW ESPERANTO BOOKS FOR YOUR READING ENJOYMENT

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

LA JUNAJ DETEKTIVOJ, J. H. Sullivan. A short novel for children of all ages, high adventure looking for smugglers, simple language, 43 pp.....	\$ .35
LA NORMANDAJ RAKONTOJ, Guy de Maupassant. 19 delightful stories, 8 full pages of pictures of Normandy, 210 pp. in all, stamped in gold, cloth	3.60
DEVENO KAJ VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO, P. Stojan. A highly subjective but thought-provoking essay on Esperanto, 110 pp.....	.75
THE ESPERANTO TEACHER, Mason Stuttard. A new Esperanto text-book in 20 lessons, with "Key" to exercises, and vocabulary, (note that the pronunciation given is not correct for American usage), 108 pp.....	.45
FINGRULINO, Hans Chr. Andersen. Translation of the famous fable of the tiny "Thumbelina", beautifully illust. in brush water colors, 18 pp. Boards	.60
TUTMONDA LAŬDO, H. G. Wannemakers, S. J.. Catholic prayerbook, including several religious songs with music, illustrated, 277 pp.....cloth	1.50
LETERO EL LA TRANSCENDO, A. B. Krempel. A religious and moral book giving advice and experiences from beyond the grave, 36 pp.....	.45
KVAROPO, poems by 4 Esperanto poets. A nicely printed collection of varied poems: lyrical, melancholic, erotic, philosophical, 270 pp. card covers	1.65
LA ALIA PASINTECO, R. Bulthuis. The story of a victim of amnesia, and how he discovered his real self through sympathetic help, 292 pp....cloth	1.85
NIKO KAJ NINO, J. F. Berger. Easy reading in original Esperanto, the story of childhood and youth in prewar Germany, 71 pp, illustrated.....	.80
KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ, Montagu Butler. Scientific analysis & full details for adapting the decimal system of classification, 144 pp.....	1.75
SPIRITAJ EKZERCADOJ, Sankta Ignacio de Loyola. 370 diversified spiritual meditations, prayers, etc., translated from the original Spanish.....	.30
KIEL AŬTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO, K. Wieczorek. An essay on the history, art and psychology of teaching, 39 pp.....	.60
FERVOJA TERMINARO, E. Rosher. Construction, laying of tracks, plans of bridges, signals for railroads with dictionary of terms. 67 pp.....	.35
ESPERANTA LEGOLIBRO, E. Migliorini. Selected stories, anecdotes and graded reading, 3rd edition, revised and enlarged, 187 pp.....	.80
ALASKA STAFETO kaj KAPTITAJ DE LA GLACIROKOJ, F. Omelka. Two stories of daring and adventure in the wild north, illustrated, 96 pp. cloth	1.10
KATALOGO DE OFICIALAJ POŝTAJOJ KUN ESPERANTA TEKSTO. Complete list to 1945, illustrated with many stamps and postmarks, 16 pp.....	.25
JUGOSLAVIO KAJ ĜIAJ POPOLOJ, pub. by Slovenia Esp. Ligo. History of old Jugoslavia, plus highly political propaganda for the regime of Tito, nicely bound, stamped in gold, profusely illustrated, 304 pp.....cloth	2.65
BIOGRAFIO DE TITO, Vladimir Dedyer (M. Stuttard). Frankly favorable, laudatory account of the rise of Dictator Tito, illustrated 500 pp....cloth	3.50
ATAKOJ KONTRAŬ ĜARDENPLANTOJ, Dr. Paul Neergaard. A full, scientific explanation of plant diseases, 9 full pages of pictures in color, and 80 other illustrations, well bound in strong red covers, 230 pp.....cloth	3.10
ELEKTROTEKNIKA TERMINARO, S. Alexandersson. Many electrotechnical terms in Esperanto and Swedish, hektograph reproduction, 24 pp.....	.35
POEMOJ DE OMAR KAJAM, G. Waringhien. Translations from the original persian verses, with a 13 page commentary, 60 pp in all.....cloth covers	.85
IVAN VI, Geraldo Mattos. Story in verse of the imprisonment of a Russian boy Czar, written originally in Esperanto, illustrated cover, 144 pp.....	1.60

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

*FOR INDIVIDUAL STUDY:* The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

*FOR GROUP STUDY:* Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**